


11

1983

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA



ESPERO KATOLIKA

SILENTI: KIAL?

Advento, tempo de silento

Tempo de sinpreparo al Kristnasko, tempo de atendo.

Tempo de silento.

Ne silento fermita, malmola, senaktiva... ne silento morta.

Sed silento de aŭskulto, de akcepto, de agado... sed silento fruktodona.

Ni bezonas silenton

Niajn orelojn sieĝas sonoj bruoj kanzonoj orkestroj sirenoj motoroj fajfoj kaj eĉ pafoj.

Al ni paroladas radioj televidoj telefonoj komputeroj gazetoj afiŝoj leteroj.

Ĉirkaŭ ni sonadas paroloj predikoj prelegoj reklamoj flatoj ploroj petoj sloganoj protestoj krioj kriegoj kriaĉoj...

Ni mem parolas, parolas, kaj fermas la orelojn, kaj nenion aŭdas el la vortoj, kiuj ĉirkaŭ ni svarmas... se ni ne silentas.

Des malpli ni aŭdas la Dian Parolon, konsistantan el vortoj « ne kiajn instruas la homa saĝeco » (1 Kor 2,13)... se ni ne silentas.

Silenti por aŭskulti

Ni havas du orelojn kaj nur unu buŝon eble pro tio, ke ni devas plimulte aŭskulti ol paroli.

Ni devas aŭskulti, por nin « sintonizi », por kun-senti, por ne resti *fremduloj*, por kapti la sencon profundan de parolo, de flustro, de ploro, de suspiro kaj eĉ de silento de nia frato, de nia patro, de nia edzo aŭ edzino, de nia *proksimulo*.

Des pli ni devas silentigi en nia koro tion, kio estas iluzia kaj pereonta, por mediti la parolon de la Eternulo.

Silenti por akcepti

Akcepti la fraton tia, kia li estas. Surpreni la ĉagrenojn de la proksimulo. Akcepti la krucon en la ĉiutaga vivo. Ĉirkaŭbraki la pekulon, kiel la kompata patro akceptis la erarintan filon, kun malfermitaj brakoj, sen eĉ unu ri-proĉvorto (Lk 15,22).

Akcepti Jesuon. Ĉar « ...al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio » (Joh 1,12).

Silenti por fari

Estas diversaj manieroj, por fari. Tiu de la artisto kiu longe, silente meditas kaj, por tiel diri, spirite konsumiĝas, antaŭ ol krei verkon. Tiu de la parlamentano, kiu ade parolas, estigas paroladan fumkurtenon, sen praktikado. Tiu de la simplulo, kiu serĉas ne parolojn sed farojn, ne kriojn sed sentojn, ne fasadojn sed fundamentojn, ne aplaŭdojn sed penojn...

Ĉar « ne ĉiu, kiu diras al mi: *Sinjoro, Sinjoro*, eniros en la regionon de la ĉielo; sed tiu, kiu praktikas la volon de mia Patro ĉiela » (Mt 7,21).

Battista Cadei

KIUJ ESTAS LA SANKTULOJ?

1-an de novembro: soleno de ĉiuj Sanktuloj

Ĉiuj baptitoj estas sanktaj ĉi-sence, ke ili apartenas al Dio per Kristo.

Kutime, tamen, ni nomas *sanktuloj* tiujn virojn kaj virinojn, kiuj estis modelaj sekvantoj de Kristo. En ili estas kaj tiuj kiuj konvertiĝis el erarvoja vivo, kaj tiuj kiuj dum sia tuta vivo klopodis sekvi Kriston. Klasika ekzemplo de la unua speco estsa la « *bona rabisto* », krucumita apud Jesuo, kaj konvertiĝinta lastamamente (Lk 23, 43). Konata estas ankaŭ la kazo de sankta Aŭgusteno (354-430), kiu rakontis siajn erarojn kaj sian konvertiĝon en libro titolita « *Konfesoj* ».

Al la dua speco apartenas homoj, kies konvertiĝo ne estis abrupta ŝanĝo, sed ĉiutaga klopodo supervenki la egoismon, kaj fariĝi kohera kristano. Inter ili estis monaĥoj kaj majstroj, kiel Benedikto kaj Tereza de Avila; sed ankaŭ popolanoj, analfabetoj, infanoj, kiel Johana de Ark, Marteno de Porres, Dominiko Savio.

Sed sanktaj estas ne nur tiuj konataj, sed ĉiuj veraj sekvantoj de Kristo. La Apokalipso prezentas vizion de « arego senmezura, kiun neniu kapablus kalkuli, el ĉiu popolo, nacio, gento kaj lingvo »; kaj estas dirite, ke « ili estas tiuj kiuj pasis tra granda afliktiĝo, kaj lavis siajn vestojn, kaj blankigis ilin en la sango de la Ŝafido » (Apok 7, 9-14). Jen la sanktuloj: la aro de la elĉetitaj per la sango de Kristo. Inter ili ja estas ankaŭ niaj parencoj, amikoj, konatoj, « kiuj antaŭpasis kun la signo de la kredo kaj tradormas la dormon de paco » (Misalo). Inter ili estas ankaŭ ni, se ni vivas « sobre, juste kaj pie en la nuna mondo, atendente la beatan esperon kaj la manifestiĝon de la gloro de nia granda Dio Savanto, Jesuo Kristo » (Tit 2, 12-13).

(Libere tradukis B. C. el « *Missioni Consolata* »)

LA SANKTA JARO, TEMPO DE REPACIĜO

Kristo tute konas la malfacilojn,
kiujn la homoj spertas,
por reciproke repaciĝi.
Per sia elĉeta sinofero
Kristo akiris por ĉiuj
la forton necesan,
por tiujn malfacilojn superi.

Neniu do rajtas diri,
ke li ne kapablas repaciĝi kun la
proksimulo,
samkiel li ne rajtas diri,
ke li ne kapablas repaciĝi kun Dio.
La Kruco faligis ĉiujn barilojn,
kiuj reciproke forfermas
la korojn de la homoj.

Johano Paŭlo la dua

LA PLEJ MIRINDA ALIANCO

(kvina parto)

La Sinaja Interligo (Eliro 24). Resumo

Sendube la plej grava etapo, en la malnovetamenta alianciĝo inter Dio kaj lia popolo, okazis ĉe la monto Sinajo. Tie, post la mirakla eliro el la egipta sklaveco, Dio donis la tabelojn de la Leĝo (la « dek ordonojn ») al Moseo. Tiu starigis dek du steleojn kaj unu altaron, oferigis bovidojn, kaj el ties sango parton li elverŝis sur la altaron kaj parton li ŝprucigis sur la popolon. Poste li laŭtlegis la Leĝon kaj la popolo sindevontigis observi la klaŭzojn (= kondiĉojn) de sia alianco kun Dio, per la adoro de unu nura Dio kaj la obeo de ties leĝoj. Ekde tiam Izraelo fariĝis la Popolo de la Alianco kun Dio de generacio al generacio. Kiel memorigilojn Moseo konstruigis la Keston de la Alianco (kiu enhavis la tabelojn de la Leĝo), kaj la Tabernaklon, tio estas, transporteblan templon, sub formo de granda tendo, kiel signon de la daŭra ĉeesto de Dio en Izraelo.

Maniero de rakontado

La rakonto de la Sinaja Alianco ne estas unueca, sed konsistas el kunfandiĝo de pluraj tradicioj, pro tio ke al la historiaj travivaĵoj aldoniĝis liturgiaj, juraj, moralaj kaj eposaj elementoj. Izraelo esprimis siajn rilatojn kun Dio, kiu liberigis ĝin el la egipta lando, sub la formo de la tiamaj interhomaj alianciĝoj, en kiuj oni interalie starigis steleojn, manĝis bruloferojn kaj verŝis sangan.

Religia mesaĝo

La izraelidoj ĉiam rigardis la liberigon el la egipta lando (kp EK 10/1983) kaj la Aliancon ĉe la monto Sinajo kiel fundamenton de sia kulto kaj de sia leĝaro. Ĉu la liberigo, ĉu la Alianco, fontas el la libervola iniciato de Dio: ĉe la komenco estas ne la homa merito, sed nur la Dia bonvolo: « Vin elektis la Eternulo, via Dio, ke vi estu lia popolo propra el ĉiuj popoloj, kiuj estas sur la tero. Ne pro tio, ke vi estas la plej grandnombra el ĉiuj popoloj, la Eternulo ekdeziris vin kaj elektis vin... sed por la amo de la Eternulo al vi... Ne pro via virteco... » (Readm 7,6-8; 9,6).

Flanke de Izraelo la kondiĉoj por la Alianco estis la fideleco al la Leĝo de la ununura Di-Sinjoro kaj la forigo de ĉia idolkulto. Siaflanke Dio surprenis Izraelon kiel sian popolon kaj montris al ĝi la vojon de la vero: « Kaj nun, se vi obeos mian voĉon kaj observos mian Aliancon, vi estos mia amata propraĵo inter ĉiuj popoloj, ĉar al mi apartenas la tuta tero. Kaj vi estos por mi regno de pastroj kaj popolo sankta » (Eliro 19,5-6). La sango de la oferitaj bovidoj estas signo de la komuniko, starigita per la Alianco, inter Dio kaj la homoj: « Moseo prenis duonon de la sango kaj enverŝis ĝin en pel-



Luca Signorelli: Moseo laŭtlegas la libron de la Alianco

vojn, kaj duonon de la sango li ŝprucigis sur la altaron. Kaj li prenis la libron de la Alianco, kaj laŭtlegis ĝin al la popolo, kaj ili diris: Ĉion, kion diris la Eternulo, ni faros kaj obeos. Kaj Moseo prenis la sangon kaj ŝprucigis ĝin sur la popolon, kaj diris: *Jen estas la sango de la Alianco*, kiun la Eternulo faris kun vi pri ĉiuj tiuj vortoj » (Eliro 24, 6-8).

Ni vidos ke Jesuo, dum sia lasta vespermanĝo, donis al la disĉiploj kalikon da vino, dirante: « Ĉi tiu kaliko *estas la Nova Alianco en mia sango* » (1 Kor 11,25); kaj li ordonis, ke ili faru tion kiel memorigilon de generacio al generacio: « Ĉi tion faru ĉiuj, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi » (samloke).

Konklude: la Sinaja Alianco estis fundamento de la izraela religio, kaj, krome, preparo de la definitiva, Nova Alianco (alivorte: Nova Testamento) en Kristo Jesuo, nova Ŝafido, kiu elverŝis sian Sangon « por ĉiuj, por la pardonado de la pekoj » (Mt 26,28).

Sac. Battista Cadei

(daŭrigota)

MARTIN LUTHER POST 500 JAROJ

Cu «patro de la kredo» aŭ «ribelulo»? Cu «reformanto» de la Eklezio, aŭ «disrompanto» de ĝia unueco? Tiaj opoziciaĵoj, kiuj bedaŭrinde dum jarcentoj kontraŭmetis protestantojn kaj katolikojn rilate al Martin Luther (*Lutero*), feliĉe mildiĝis, kaj unuj kaj aliaj povas kune memori la 500-an datrevenon de lia naskiĝo (10.11.1483) sen unuflankecaj troglorado aŭ malhonorado. Tion ni ŝuldas al la ekleziana spirito, kiu ebligis pli objektivan historian esplorado. Pluirante laŭ tiu vojo, espereble maldensiĝos la ombroj, kiuj ankoraŭ restas. *Espero Katolika* memorigas la 500 jarojn ekde la naskiĝo de Lutero, intervjuante luteranan pastoron, nome la respektindan Adolf Burkhardt, prezidanton de KELI, al kiu iras sincera danko.

E.K.: Kiun sencon havas, ĉe la nuntempaj luteranoj, la persono, la figuro de Martin Luther?

Burkhardt: La eklezio al kiu mi apartenas, la Evangelia Eklezio de Virtembergo, en sia nomo ne portas la nomon de Luther. Certe, en la konfesia senco, ĝi estas luterana kaj ŝuldas multon eĉ de sia hodiaŭa formo al la instruo kaj influo de la reformaciestro. Sed se la nomo de Jesuo Kristo estas ĉiutaga realaĵo en la spirita vivo de nia eklezio kaj de la unuopa kristano, la persono de Luther nur de tempo al tempo venas en nian memoron. Kompreneble la 500-jara datreveno de lia naskiĝo donas okazon, pli ofte aludi al li kaj liaj verkoj. La historio de nia popolo kaj de niaj eklezioj estas ne imagebla sen li. Ni kredas, ke li estis ilo en la manoj de Dio. Sed ni certe ne rigardas lin kiel heroon aŭ seneraran modelon.

E.K.: Kiun sencon havas lia mesaĝo?

Burkhardt: Sen la traduko de la Sankta Biblio fare de Luther ne ekzistus komuna germana lingvo. Tion rekonas kaj nunjare celebras ankaŭ nereligiaj germanoj, inkluzive de marksistoj. Lia mesaĝo por mi kompreneble ne limiĝas al tiu kultura flanko. Atentigo pri la decida signifo de la Biblio kaj pri ties centro: la savo per Jesuo Kristo, restas valida flanko de lia verko. Li akcentis, ke la vera temo de la teologio estas la kulpa kaj perdita homo kaj tiu Dio, kiu justigas kaj savas. Dum jarcentoj, eĉ simplaj homoj en la luterana tradicio bone konis la Biblion kaj parkere povis kanti multajn himnojn de fido kaj kristana espero. Bedaŭrinde tio tute ne plu estas vera pri multaj nunaj anoj de nia eklezio. Do la mesaĝo de Luther hodiaŭ estus alvoko: revenu al la Sankta Skribo, studu ĝin, apliku ĝin al via ĉiutaga vivo.

E.K.: Ĉu laŭ vi evoluis la sinteno de la protestantoj rilate al Martin Luther? Kaj la sinteno de la katolikoj?

Burkhardt: Sendube ĝi forte evoluis. Estis tempoj, kiam oni misuzis kaj miskomprenis lin por konfesia sinpravigo kaj nacia orgojlo. Iuj monumentoj starigitaj okaze de reformacia jubileo montras lin kiel heroon, kiu kuraĝis defii imperiestron kaj papon. Tio estas tre for de niaj sentoj nun. Ni lernis, ke

oni ja bone povas danke akcepti la benojn, kiujn Dio donis pere de iu homo — do, ĉi-rilate, pere Luther — kaj tamen ne prisilenti erarojn kaj mispaŝojn. Luther bezonas la gracan pardonon de Dio ne malpli ol mi. Lia sinteno en la Kamparana Milito estas kritikigebla; liaj disputoj pri la bapto verŝajne estis neeviteblaj, sed ili kontribuis al la sanga persekuto kontraŭ la rebaptistoj. Liaj pamfletoj kontraŭ la judoj estas terurajo kaj neniel defendeblaj. — La sinteno de katolikoj dum jarcentoj dependis de la prezento de Luther fare de teologo, kiu ne komprenis la fortan deziron de Luther renovigi la eklezion kaj por tio gajni komprenon en la altaj instancoj mem, kaj tiu prezento tute nebligis al la katolika scienca esploro ekvidi la veran Lutheron. Tio radikale ŝanĝiĝis en nia jarcento — la verko de la katolika historiisto Joseph Lortz kaj liaj disĉiploj prilumas lin tiel, ke multo fariĝas komprenebla, eĉ se ne ĉio akceptebla el Roma vidpunkto. Kaj tiu nova sinteno malfermis la vojon al komunaj studoj, kiuj surprize proksimiĝas eĉ tikkajn punktojn de doktrino kaj emfazo.

E.K. Kio, laŭ vi, pleje estas bezonata ĉe la nuntempaj kristanoj, ĉu protestantaj ĉu katolikaj?

Burkhardt: Daŭrigi sur la komencita vojo ekumena, fidante la gvidon de la Sankta Spirito, ŝajnas al mi grava tasko. Multloke ja la unua elano forvaporigiĝis. Seniluziigaj spertoj, verŝajne ambaŭflanke, bremsas. De Luther ni povas nove lerni, kiel ni turnu la rigardon al Jesuo Kristo, kiu sola povas eterne helpi al ni. La interpreto, kiun li donis en sia Malgranda Katekismo pri la unua ordono, direktas nin al la centro: « Ni timu, amu kaj konfidu Dion pli ol ĉiujn kreitaĵojn ».

La sopiro al unueco, kiu longe tute forestis kaj nun kreskas en ĉiuj eklezioj, respondas al la volo de Kristo mem.

E.K. Dankon pro la intervjuo.

JOHANO PAŬLO LA DUA KAJ LA JUBILEO DE M. LUTHER

Pri la ĉiunivela pliboniĝo de la luteranaj-katolikaj interrilatoj atestas, interalie, signifoplenaj elpaŝoj de la Papo. Jam okaze de sia vojaĝo tra Germanio en 1980, li sin prezentis al la protestantoj kiel « pilgrimanton en la lando de Martin Luther ».

Ankoraŭ pli malkaŝe li sin esprimas en letero sendita al kard. Willebrands (Prezidanto de la Pontifika Sekretariato por la Unueco de la Kristano) okaze de la Lutera jubileo. Johano Paŭlo la dua agnoskas « la profundan religiemon de Luther... kiu kun arda pasio estis pelata de la demando super la eterna savo », kaj konstatas la ekumenan spiriton, kun kiu la evangeliaj-luteranaj Eklezioj celebras lian jubileon, kaj en tio li ekvidas « fratan inviton, por kune akiri komunan kaj kompletan tutvidaĵon de la historiaj eventoj, kaj kritikan profundigon de la multflanka heredaĵo

de M. Luther... ». « La kulpo — emfazas la papa letero — kie ĝi ekzistas, devas esti agnoskata, kie ajn ĝi troviĝas... Nin devas gvidi ne la intenco ekstarti kiel juĝistoj de la historio, sed nur la intenco plibone kompreni la okazintaĵojn kaj fariĝi portantoj de la vero... ». Tiele « ni povos trovi komunan interpreton de la pasinteco kaj samtempe atingi novan deirpunkton por la dialogo en la nuntempo ».

KRISTANA-ISLAMA DIALOGO

Publikiĝis antaŭ nelonge la dua eldono (en franca lingvo) de « Orientiĝoj por dialogo inter kristanoj kaj islamanoj ». Aŭtoro estas Maurice Borrmans, misiisto el la « Blanksutanaj Patroj », kiu dum 20 jaroj, en Nord-Afriko, kontaktis kun islamaj komunajtoj. Post la prezento de la « interparolantoj », la libro esploras la « lokojn kaj vojojn » de la dialogo, klarigante, ke ĝi celas ne al sinkretismo (=konfuza kunmiksado), nek al senfrukta polemiko, sed al reciproka lernado, en fideleco al la vojo, kiun Dio montris al ĉiu el ni. Aparta ĉapitro estas dediĉita al la « agnosko de la valoroj de la aliuloj », kaj alia, tute realisma, al la « aktualaj malfaciloj ». Fine la libro traktas pri la konkretaj eblecoj de kunlaboro sur la humana-sociala kaj sur la spirita-religia kampoj.

(El "Mondo e Missione"; el la itala tradukis B.C.)

La Papo al Andropov kaj Reagan

VI DEVAS INTERTRAKTI

Ĵaŭde, la 27-an de oktobro, Johano Paŭlo la dua sendis mesaĝojn al ambaŭ gvidantoj de la du superpotencoj, nome Ronald Reagan kaj Juriĵ Andropov. La postan sabaton, ĉe la fermo-parolado al la Generala Sinodo, la Papo informis jene la ĉeestantaj Episkopojn:

« koncerne la nuntempan mondon, ni estas atestantoj de la kontraŭstaroj en ĝi pli kaj pli grandigantaj, kaj de la diversaskalaj minacaj konfliktoj. Ili ĉiuj laŭtvoĉe krias favore al repaciĝo — laŭtvoĉe, ĉar pli kaj pli klara fariĝas la elokvento de la katastrofoj kaj ruinegoj, per kiuj ĉi tiuj pligrandigantaj kontraŭstaroj minacas la tutan homaron.

En viaj paroloj vi esprimis vivan zorgon por la paco en la mondo. La internacia situacio estas tre streĉita, kaj ankaŭ mi estas profunde zorgigita. La Eklezio devas klopodi per ĉiu rimedo je dispono, por forteni la danĝerojn minacantajn la mondan sekurecon, kaj instigi la respondeculojn al la vojoj kondukantaj al garantiita kaj stabila paco. Lastajaŭde mi adresis personan mesaĝon al la Prezidantoj de Usono kaj de la Plej Supera Komitato de Sovetunio, petante, ke ili volu ne ĉesigi la intertraktadon, kiel ununuran rimedon por glatigi diferencojn kaj intereso-konfliktojn, kaj ĉesigi la vetarmadon, kiu tiom zorgigas la nuntempan homaron ».

Johano Paŭlo la dua

Kristnasko 1983: tutmonda ekumena alvoko

Kristnasko estas la momento de la kreado, la decida horo. La vivo devas naskiĝi, la vivo volas naskiĝi: la vivo, kiu batalas por veni en la mondon; la vivo minacata de malsato, de interna malpleno; la vivo persekutata, buŝumata, torturata, la vivo kiun Dio ŝirmas pli efike ol ĉia armilo!

Kristo naskiĝis. La vivo estas al ni donita.

Ni elektu la vivon!

Nia planedo estas vilaĝo. Ni jam dependas unu de la alia, en bono kaj en malbono. Ni ĉiune pereos, aŭ ĉiune nin savos.

Ni elektu la unuecon!

Ni dividu nian panon! Tiam ĝi fariĝos pano de justeco kaj paco.

Ni malfermu la okulojn, ne timu!

Kristanoj, bonvolaj homoj, registaroj, ni devas kaj povas starigi universalan pakton por ĉesigi la vetkuron al sinarmado, elpuŝi la atomajn armilojn, certigi al ĉiu panon, laboron kaj liberecon. Ni donu videblan signon de fido kaj sindevigo. Ni ĉiune estigu, de unu limo ĝis la alia de la mondo, ĉenon de justeco kaj paco, repaciĝo kaj solidareco, amikeco kaj espero.

19-23.12.1983: Universala Semajno de fasto kaj preĝado

Por emfazi nian decidon elekti la vivon anstataŭ la morton, la dialogon anstataŭ la interbatalon, la solidarecon anstataŭ la egoismon,

Ni fastu dum unu tago

kaj donu la egalvaloron de unu manĝo al iu organizo (*) por helpi la viktimojn de malsato, de maljusteco, de perforto kaj de subpremado.

Ni faru konhretajn agojn

cele al solidareco kaj repaciĝo, trans la baroj de aĝo, kredoj raso, naciecoj.

Ni alvoku la regantojn

dediĉi parton el la nekredeblaj riĉaĵoj elspezataj por armiloj, por gajni la militon kontraŭ malsato kaj malriĉeco en la mondo.

Ni preĝu,

por ke ĉi tiu ĉeno de repaciĝo kaj solidareco plivastiĝu al ĉiuj homaj estaĵoj, kaj forigu la katenojn de maljusteco kaj timo.

24.12.1983: ekbruligu la flamon de la paco!

La vesperon de la antaŭtago de Kristnasko, ĉiuj estas invititaj montriĝi ĉe hejma fenestro aŭ pordo kun brulanta kandelo aŭ lumigita lampo en la mano, kiel signo de amikeco al la najbaroj kaj al ĉiuj popoloj de la tero.

Kristnasko! La stelo montras la vojon, kiu kondukas al infano ĵus naskita. Lumo en la nokto, Dio meze de la homoj.

Kristnasko! Ĉiun duan sekundon infano mortas pro malsato; la mondo enabismiĝas en la nokton de mizero, de perforto, de soleco

Kristnasko! Dio baldaŭ naskiĝos. La homo baldaŭ naskiĝos. La lumo venkas la mallumon, la fido movas la montojn, la espero revivigas niajn korojn, la amo triumfas super la morto.

Kristnasko! Inter ĉielo kaj tero, virinoj kaj viroj, junuloj kaj maljunuloj, riĉuloj kaj malriĉuloj, Nordo kaj Sudo, Oriento kaj Okcidento. Lumo trapasas la murojn, kiujn ni starigis; ĝi varmigas la korojn, lumigas la rigardojn, dissolvas la froston de nia indiferenteco, de niaj antaŭjuĝoj, de niaj malamoj.

(Iniciato « Kristnasko por la paco », Genevo, Svislando)

(*) Ekzemple, la Misia Kaso de IKUE

Travivaĵoj

KRISTANO ADIAŬAS

La franciskana patro Wejnborg, nederlanda kunlaboranto de la itala revuo « Regno », skribis al tiu revuo adiaŭan leteron, kiun ni esperantigas kaj publikigas, ĉar ĝi estas kristane pensiga kaj modela.

Tre respektinda kaj kara patro Alfio,

antaŭ kelke da tagoj mi aŭdis de la kuracistoj de la ĉi-tiea hospitalo « Sankta Antonio », ke mi havas kanceron, nek operacieblan nek kuraceblan, ĉe ambaŭ pulmoj. Tio ne tro min konsternas, sed prefere mi sentas min feliĉa esti vokita de Dio al la ĉielo. Mi petas, tamen, ke vi havu la bonkorecon propeti por mi ĉe la Patrino de Dio kaj nia, por ke kuraĝe mi pasu de ĉi tie al la ĉielo.

Mi estas al vi profunde danka pro la amikeco ĉiam de vi al mi montrita. Eble vi povus aranĝi ĉe la administracio... ke mia jarkolekto 1983 de la revuo fariĝu kompleta. Poste, ne plu necesos sendi al mi la surteran « Regno »-n.

Ĉe la fino de mia kunlaboro, mi deziras al vi belan kaj longan daŭrigon de via laboro por la Regno de Kristo...

Tre kara patro Alfio, ke Dio ĉiam vin protektu kaj konduku.

Elkorajn salutojn, kaj ĝis la revido en la ĉielo.

Via plejame

frato Rinaldo Wejnborg OFM

Utrecht, 17.9.83

(El « Il Regno »)

Travivaĵoj

LA BLINDA KNABO

Papo Johano la 13-a, kiam ajn li povis, ŝatis viziti la malriĉulojn, malliberulojn kaj malsanulojn. Li konsolis ilin kaj donis al ili sian patran benon, precipe al tiuj kiuj suferis.

Iun tagon li eliris por viziti la Hospitalon « Jesu-Infano » en Romo, kiu gastigas malsanajn infanojn. Li iris de ĉambro al ĉambro, de lito al lito. Li ridetis kaj diris bonan vorton al ĉiu infano.

La infanoj kriis: *Johano, Johano!* Ŝajnis, ke Papo Johano estas unu el iliaj fratoj. Li ekhaltis ĉe knabeto kaj demandis: « Kiel vi nomiĝas? ». « Mi nomiĝas Anĝelo », respondis la knabo.

« Ho, Anĝelo! Mia nomo estis Anĝelo iam, sed nun mi nomiĝas Johano ». Tiam li turniĝis al alia lito, en kiu estis blinda knabo. La knabo diris al li: « Mi scias, ke vi estas Papo Johano, sed mi ne povas vidi vin ».

La okuloj de la Papo pleniĝis per larmoj; li sidiĝis kaj parolis longe kun la blinda infano. Poste li donis al li bombonojn.

(El « Mezmaro Stelo », organo de la Malta Esperanto-Societo)

Therese Abela

UNICEF: KIEL LA MONDO HELPAS SIAN INFANARON

En decembro okazos la 37-a datreveno de UNICEF, la vastega internacia Fonduso, kiu helpas la malriĉan infanaron de la tuta mondo travivi decan vivon.


La Fonduson oni starigis tuj post la fino de la dua mondmilito, kun la nura celo savi milionojn da infanoj de morto pro malsate kaj malsano. Pli ol 60 nacioj kunigis siajn fortojn por helpi infanojn el 14 landoj ruinigitaj de la terura milito.

Dekomence prezentiĝis enormaj, urĝaj problemoj. Haste oni bakis fulm-rapidajn programojn por sendi senprokraste la plej necesajn varojn. Tiu pionira agado iĝis fajrero sufiĉa por naskigi novan senton en la evoluantaj landoj, kiuj ekkonsciis, ke en Afriko, Azio kaj Latina Ameriko vastaj homamasoj vivas en neeltenebla mizero, kaj ke ion oni devas fari.

En 1950 Unuiĝintaj Nacioj komencis pridiskuti la aferon, kaj post tri jaroj la Fonduso estis rajtigita agadi laŭ konstanta mandato kaj per pli taŭga strukturo.

Novaj gvidprincipoj

Dum la jardeko 1960-70 estiĝis « revolucio » en la gvidprincipoj de UNICEF. Ĝis tiam oni opiniis, ke al infano malriĉa sufiĉas doni manĝon; sed oni ekvidis, ke ankaŭ necesas *instrui* la infanon, kiu estas la semo de la estonta socio. Juna homido, kiu ricevas manĝon kiel donacaĵon, plenkreske ne kapablos havigi al si panon per siaj manoj. Knabo kiu lernas *laboron* ekposedas ilon por havigi al si manĝon en la estonteco.



Amikeco (desegnaĵo de Titta Vinti, 9-jara infano el Romo)

Jen do la nova gvidlino de UNICEF: la instruado de la junaj generacioj estas la nura vojo por konstrui novan socion, tie kie « socio » proprasence ankoraŭ ne ekzistas. UNICEF komencis aranĝi lernejojn kaj kursojn pri agrikulturo kaj ĉiuspeciajn metiajn laborojn.

Kiu, kiel, kiom pagas

UNICEF ricevas volontulajn subvenciojn. En 1982, 75% el la mono venis de 135 registaroj, kaj 25% de privatuloj aŭ institucioj. En 1982, oni kolektis entute 378 milionojn da usonaj dolaroj. Laŭ la donitaĵoj de 1978, la elspezoj koncentriĝis precipe bazajn sanitarajn servojn (34%), instruadon (21%), liveradon de trinkakvo (19%), nutrado (8%), socialajn servojn (7%), kaj krizokazajn helpojn (3%). En 1982, oni povas rimarki kreskon de la elspezoj por trinkakvo (28%), kaj malkreskon de tiuj por sanitaraj servoj (24%) kaj instruado (14%).

UNICEF interligas multajn landojn en reto de klopodoj por reciproka helpado en diversaj kampoj. Estas menciinde, ke ankaŭ la kontribuantaj landoj rajtas ricevi helpon okaze de krizostato. Cetere, UNICEF ne konas landlimojn.

Taskoj de la Registaroj

Ĉiu registaro devas doni absolutan prioritaton al unu programo, kaj liveri tion, kio estas bezonata por ĝia efektivigo: monon, homojn, ejojn. Kaj ĉiuj registaroj akceptas la principon, ke rajtas ricevi helpon ĉiu bezonhava infano de la tero, sendistinge pri raso, kredo, nacieco aŭ politikaj ideoj.

Esperanto, ĉiama tabuo

Sur tiu fono de universaleco, de *komuna* helpo, *komuna* agado, cele al *komuna* mondo, ĉu oni planas instrui *komunan* lingvon al la tutmondaj infanoj, kiel rimedon de internacia interkompreniĝo? Absolute ne! UNICEF ĉiam malvarme kondukis fronte al tiu ideo, malgraŭ sporada uzado de Esperanto dum kelkaj internaciaj UNICEF-aranĝoj.

Nobelpremio al UNICEF

En 1956 UNICEF ricevis la Nobel-premion por la Paco. La rilato de tiu Instituto al paco estas trafe emfazata en la motivigo de la premio: « La ĉefa afero estas la grandega progreso survoje al la celo de internacia kunlaboro... UNICEF estas kreanta ligilon de solidareco inter la riĉaj landoj kaj tiuj malriĉaj... Ĉie iĝas ĉiam pli forta la sento, ke la mondo estas fakte unu granda familio. Por krei pacan mondon, ni devas zorgi pri la paco, ni devas zorgi pri la infanaro ».

Nu, tiaj vortoj estas jam dumiljaraj. Kvankam ili strange eĥiĝas en la nuntempa, suferplena mondo, estas ĉiam plezure reaŭdi ilin. Kaj ni memoras la vortojn de Kristo (Luk 18,16): « Lasu la infanojn veni al mi, kaj ne malhelpu ilin; ĉar el tiaj estas la regno de Dio ». Laŭ mi, tiuj vortoj entenas la tutan esencon de la vivo. Ni neniam forgesu ilin.

Franca Arganini

ŜULDOJ DE LA TRIA MONDO: ĈU NESOLVEBLA PROBLEMO?

La ĉi-somera sesio, en Beogrado, de UNCTAD (Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Komerco kaj Evoluigo) atentigis la mondon pri la terura ŝuldaro de la « malriĉaj landoj ». Ĝi riskas, unuflanke, kolapsigi la tutmondan banko-sistemon, kaj aliflanke izoli la landojn de la Tria Mondo disde la internacia financa kaj komerca cirkulado.

La totala ŝuldaro de la Tria Mondo al la okcidentaj bankoj estas ĉirkaŭ 630.000 milionoj da dolaroj, dum la ĉiujaraj helpoj de la industriaj landoj (30.000 milionoj da dolaroj) ne sufiĉas por pagi la interezojn.

Kiel solvi la problemon? Se la ŝuldantaj landoj unuflankece interkonsentus inter si, por ne pagi la ŝuldojn, oni ilin eksigus de la internacia banka kaj komerca sistemo, kiel jam okazis kun Kubo (1961) kaj kun Korea Popola Demokrata Respubliko (1974), kiuj rifuzis ĉiujn siajn eksterlandajn ŝuldojn.

Aliflanke, la bankoj de la kreditoraj landoj ĥaosigis kaj eĉ bankrotus. Por doni imagon de la amplekso de la fenomeno, ni notu, ke Meksikio havas ŝuldojn kun 1.400 diversaj bankoj, Brazilo kun 1.000, Pollando kun 400.

Al la ĉirkaŭ 3.000 delegitoj de 160 landoj kaj internaciaj organizaĵoj, kiuj partoprenis en Beogrado la sesion de UNCTAD, ankoraŭfoje evidentiĝis la abismo, kiu disigas la nordan kaj la sudan partojn de la mondo, kiel ankaŭ la konfuzo kaj malordo, kiuj regas la ekonomiajn kaj komercajn rilatojn sur la terglobo. Kvankam la konkretaj rezultatoj de la Konferenco en Beogrado estas malgrandaj, oni povas rimarki, ke pluraj landoj forlasis ekstremismajn starpunktojn kaj fariĝis pli realismaj: la ekonomia bonfarto de la malriĉaj landoj estas nepra kondiĉo por la paco, kaj ne malhavebla faktoro por la bonfarto ankaŭ de la okcidenta mondo. Ĉu la solidareco iam venkos kontraŭ la blinda egoismo? Aŭ ĉu la registaroj plufrenezos en la konstruado de mortigiloj?

B.C.

✿ Nia amo al Dio devas esti tute senmezura (*Ch. de Foucauld*)

✿ Dio estas tiel granda! Tiel granda estas la diferenco inter Dio kaj ĉio, kio ne estas li! (*Ch. de Foucauld*)

✿ Ni serĉu Jesuon. Oni povas Lin serĉi en du manieroj: serĉi Lin, kiam oni ne konas Lin, kaj serĉi Lian volon kiam oni Lin konas (*Ch. de Foucauld*)

✿ Kiam vi sentos vin laca, malĝoja, sola, posedata de la sufero, retiriĝu en la internan sanktejon de via animo, kaj tie vi trovos vian *fraton*, vian *amikon Jesuon*, kiu estos via konsolanto, via subtenilo, via forto (*Ch. de Foucauld*)

✿ Legi, relegi, pripensi la Evangelion, kaj klopodi ĝin praktiki (*Ch. de Foucauld*)


ALIA VETERANO FORPASIS

Sac. Prof. Johano Baptisto Kao, franciskano, mortis subite 8.10.83, pro surstrata koratako. Ĉar li ne havis kun si dokumentojn, dum dek tagoj oni ne rekonis lin, kaj nur sekve de alvokoj per radio kaj ĵurnaloj oni sukcesis identigi lin. La enteriga ceremonio okazis 27.10.83.

Pri la escepta personeco de Pastro Kao (Dumviva Membro de IKUE, dum pluraj jaroj ĝia Landa Reprezentanto en Ĉinio/Tajvano, vigla aganto precipe en junularaj kaj universitataj rondoj, aŭtoro de pluraj publikaĵoj), ni prezentas ĉi tiujn donitaĵojn, ĉerpitajn el niaj arkivoj:

« Dum pli ol 50 jaroj Pastro Kao faris pioniran laboron por Esperanto en multaj landoj de Azio, Eŭropo, Norda kaj Suda Ameriko. Li lernis Esperanton kiel seminariano en Ĉinio, sub gvido de la itala franciskano Giovanni Ricci, kaj fondis Esperanto-grupon en la Seminario. Kiam liaj superuloj sendis lin al Eŭropo por daŭrigi siajn studojn, unue en Romo kaj poste en Francio, li uzis ĉiun okazon por propagandi Esperanton. Li partoprenis diversajn naciajn kaj internaciajn Esperanto-kongresojn, inter ili la Universalan Kongreson en Kolonjo (1933). Dum la dua mondmilito li vivis en Nord-Ameriko kaj partoprenis multajn Esperanto-laborojn. Li, kun George A. Connor, Doris T. Connor kaj d-ro William Solzbacher, kunlaboris je la grava verko «*Esperanto: the world interlanguage*».

Post la milito, Pastro Kao reiris al Ĉinio, fariĝis Ĝenerala Vikario de la Diocezo Fengsiang, ĉefredaktoro de katolika ĉiutaga gazeto en Sianfu,



P. Kao donas lecionon pri Esperanto (1977)

kaj fine Direktoro de la Eduka Sekcio en la Ĉina Katolika Centra Oficejo en Ŝanhajo. La politikaj eventoj devigis lin forlasi sian hejmlandon. Dum multaj jaroj li vojaĝis en Norda, Centra kaj Suda Ameriko, helpante ĉinajn rifuĝintojn, zorgante pri la religiaj bezonoj de ĉinoj kaj kunlaborante en edukaj kaj religiaj projektoj. En Peruo li estis animprizorganto de granda ĉina loĝantaro. En Argentino li multe helpis la lokan Esperanto-movadon, kaj eĉ verkis vortaron Esperanto-hispanan. En Brazilo li organizis la Internacian Eŭkaristan Mondkunvenon okaze de la Eŭkaristia Kongreso de Rio de Janeiro (1955). Pastro Kao ankaŭ redaktis la rimarkindan ilustritan Memorlibron (216-paĝan) pri la Mondkunveno. Kelkajn jarojn poste li iris al Tajvano, kaj fariĝis Profesoro kaj Dekano en la Katolika « Fu-Jen » — Universitato (Filozofia Fakultato). Krom multaj tre vizititaj Esperanto-kursoj, ŝuldiĝas al li (kun la helpo de la nun mortinta Kardinalo Paŭlo Yu Pin, li mem esperantisto) impona Esperanto-Ekspozicio en la Centra Nacia Biblioteko de Taipei (aprilo 1978) ».

Ni memoru pri Pastro Kao en niaj preĝoj.

ALVOKO AL LA MALSANULOJ

Ni alvokas ĉiujn malsanajn IKUE-anojn unuiĝi kun ni, en la ĉiutaga esperantlingva preĝado je la papaj preĝintencoj, laŭ la propono de P. Louis Bourdon (v. EK 10/1980, p. 136).

La Sankta Patro ĉe ĉiu okazo rememoras la malsanulojn. Nia preĝado povus estis donaco de la esperantistaj malsanuloj al li.

Ni jam de tri jaroj praktikas tiun preĝadon, kaj ni ĝojus legi en EK, ke ankaŭ aliaj malsanuloj faras simile en la nuna Sankta Jaro de la Elaĉeto.

Malsanaj eks-flegistinoj el Ĉeĥoslovakio

★ Malgraŭ niaj insistaj petoj, daŭre alvenas pagoj per bankaj ĉekoj. Ni ripetas, ke IKUE *ne povas enkasigi ĉekojn*, se la ĉeko havas la klaŭzon « neĝirebla » (tiu klaŭzo estas aŭtomate aplikata de la banko, se temas pri pago venanta el eksterlando). La internaciaj pagoj pere de banko estas fonto de multaj ĝenoj, ĉar oni devas plenigi multajn formularojn kaj fari multajn deklarojn pri la kaŭzo de la pago; krome, oni pagas sufiĉe altan makleraĵon *ĉe la enkasigo*, kaj tio rimarkinde malplivalorigas la pagon (en kazo de pago de malgrandaj sumoj, la makleraĵo povas eĉ egaligi la valoron de la pago!). Pro tio, ni ripetas, ke oni ne pagu per banko, aŭ ke oni indiku kiel adresiton « Antonio De Salvo », *sen aliaj mencioj*. Poŝta ĝiro aŭ poŝta mandato restas, tamen, la preferinda pag-rimedo.

TRA LA MOVADO

★ Mons. Karel Otčenašek (Episkopo en Ustì nad Labem, Ĉeĥoslovakio, ne agnoskata de la ĉeĥoslovaka Ŝtato), Esperantisto, skribis al la Prezidanto de IKUE leteron *en Esperanto*, datitan 10.10.83, en kiu, interalie, li diras:

« Mi plene subtenas la ideon soleni la dumiljaran jubileon de la naskiĝo de Nia Sinjorino.

Mi ofte rememoras pri Vi, pri la tuta esperantistaro, kaj mi ĝojas, ke la Internacia Lingvo, jam per sia ekzisto, helpas plenumi la taskojn donitajn al la Papa Konsilio por la Kulturo, nome praktiki dialogon inter diversaj kulturoj, kaj tiel partopreni en konstruado de vera paco kaj frateco sur la Tero.

Vin, Viajn kunlaborantojn kaj Vian tutan laboron benas

† Karel Episkopo »
(*Raportis Duilio Magnani*)

★ 25.9.83 havis lokon S. Meso en Esperanto en la Kapelo de Sankta Kruco en la paroka preĝejo de la Sankta Triunuo en Bydgoszcz, Pollando (str. K. Świerczewskiego 26). Tiaj Mesoj okazas ĉiun lastan dimanĉon de la monato je la 17-a horo.

Ĉe-okaze, oni bonvolu noti, ke la foto aperinta en EK 6/83, p. 99, prezentas ĝuste S. Meson en Bydgoszcz, ne en Opole.

(*Raportis Leszek Łegowski*)



S. Meso en Bydgoszcz (foto Łegowski)

★ Okaze de la elekto de la nova Superulo de la Jezuita Ordeno, la nederlandano Peter-Hans Kolvenbach, la Prezidanto de IKUE sendis gratulan leteron, menciante plurajn Esperanto-iniciatojn ligitajn kun la agado de la Jezuitoj: la elsendojn de Vatikana Radio (kiu estas estrata de Jezuitoj), la apogon al la « Apostolado de la Preĝo » (same prizorgata de Jezuitoj), kaj la gastigadon al la roma IKUE-grupo en la Pontifika Instituto por Orientaj Studoj (kies ĝisnuna Rektoro estis ĝuste Pastro Kolvenbach).

La eminentulo tiel respondis al Pastro Magnani (en itala lingvo), 20.10.83:

« Tre Respektinda Pastro Magnani,

mi multe dankas pro la afabla bondezira letero, akompanata de preĝoj, kiun vi sendis al mi la 12-an de oktobro, ankaŭ en la nomo de la Katolikaj Esperantistoj, kies plenvalora Prezidanto vi estas.

Mi povis ekkoni la afablecon de la Esperantistoj, gastigataj por siaj renkontiĝoj ĉe la Orienta Instituto. Multajn gratulojn kaj bondezirojn por la diversaj iniciatoj, pri kiuj vi skribis al mi.

Kum estimo kaj frataj salutoj

Peter-Hans Kolvenbach »
(*Raportis Duilio Magnani*)

★ HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta Esperanto-gazeto, estas de 63 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 17 numeroj jare, kun ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, anoncetoj, libera Tribuno de la legantoj, fotoj, fakaj suplementoj, ktp. Jara abono: egalvaloro de 16 us. dol. Mendu provnumeron ĉe la redakcio (calle de Juan Ramón Jiménez 28, 6^o A, Madrid 16, Hispanio).

PAGU FRUE VIAN KOTIZON 1984!

Ĝis la fino de la kuranta jaro validas la ĝisnunaj tarifoj; ekde 1.1.1984 validos tiuj (ĝenerale pli altaj) anoncitaj en EK 10/83, p. 157.

Frua pago ŝparigas monon al la abonanto, kaj tempon kaj zorgojn al nia administracio.

⊗ Pri la *vokiĝoj*, laŭ la senco mem de la vorto, la tasko de la homoj estas nur *aŭskulti, konstati kaj obei*; ili tute ne devas fari elekton, sed aŭskulti, konstati la *vokon* de Dio, kaj obei al tiu voko (*Ch. de Foucauld*)

⊗ Kiam ni estas en la mallumo, en la nokto, ni tute ne senkuraĝiĝu, ni estu konvinkitaj, ke Dio viglas super ni kaj ĉiam nin gvidos, ĉu ni tion konscias aŭ ne konscias, kondiĉe, ke ni estu fidelaj (*Ch. de Foucauld*)

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tiuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝigo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
RA - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 170

Belgio

H. Audenaert
Beekstraat, 6
B-9100 Lokeren
p.k. 000-0522242-91; b. fr. 500

Brazilo

P. Petro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S.P.
cruz. 1.000 - aerp. 1.600

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Jan Sebela
Okrajová 1156
CS-67401 Trebič

Francio

P. R. Degrelle
B.P. 23
F-54510 Tomblaine
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 70

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D- 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 25

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
St. Mathias Church,
Ashok Nagar,
Madras 600083

Hispanio

Miguel Martinez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 1.200

Hungario

P. Lajos Köbor
H-9372 Csapod

Irlando

P. J. O'Reilly
«Monksilver», Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavik

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 11129475 (UECI) -
lir. 14.000

Japanio

Hatirô Matubara
Namimatu-tvô 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Fraujo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 400

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlebourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Calle 54 No 56-12
Apartamento 201
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
MEX-68000 Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat. 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 27

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL - 59312 Chocianowice
zl. 500

Portugalia

Port. Esp. Asocio
Rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
700 esk.

Svislando

P. Francisko Bommer
Collège S. Marie
CH - 1920 Martigny

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. Marko Ŭang Bu-jung
168 Chungmei Road
Hua - Lien
Taewan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Alberta S. Casey
P.O. Box 626
La Jolla, CA 93038-626
us. dol. 11 - aerpoŝte 15

